## Zepelino kaj Dizelo

Du el la plej famaj germanaj pioniroj de siaj tempoj, *Ferdinand Graf von Zeppelin* (1838-1917) kaj *Rudolf Diesel* (1858-1913) neniam persone renkontiĝis. Iliaj kontaktoj limiĝis al du poŝtkartoj. La unuan skribis Dizelo kaj, en ĝi, petis ĉeesti la lanĉadon de *LZ 1*, la unua stirebla rigida aerŝipo. Aldone li demandis, ĉu eble estus bezono por dizelmotoroj. Malfavore Zepelino respondis, ke la trakcimeĥanika problemo jam estas solvita (*LZ 1* estis provizita per du *Daimler*-motoroj kun po 16 ĉevalpovoj), kaj ke li ne povus ekligiĝi kun neelprovitaj metodoj. Tamen li deponis senkostan enirbileton por la provflugo la 2-an de julio 1900. Nur en la jaro 1928 oni opiniis la pez-oleajn agregatojn sufiĉe fidindaj kaj ekipis *LZ 127* – kiel unuan aerŝipon – per kvin dizelmotoroj (po 550 ĉevalfortoj). Tiam tamen estis tro malfrue por ambaŭ sinjoroj por plua interŝanĝo de poŝtkartoj… (2007-07-02)

## Deveno, kredo, lingvo

Laŭevolue de siaj reformdekretoj el la jaro 1700, Petro la Granda (1672-1725) volis devigi la "skismulojn" (t.e. la al la malnovrusa tradicio fidelajn *raskolniki*) fortranĉi siajn barbojn. Sekve de tio multaj ukrainaj malnovkredaj fiŝistoj fuĝis el la regiono apud Odeso trans la Nigran Maron en la Danubodelton, kie ankoraŭ hodiaŭ vivas iliaj posteuloj – la Lipovenoj. Tiu nomo devenas de la ligno de la tilio (ruse: *lipa*), el kiu ili lignoskulptis ikonojn. En la Danubodelton iom pli poste fuĝis ankaŭ ukrainaj malnovkredaj kozakoj, kiuj ribele opoziciis kontraŭ Katarino la Granda (1729-1796). La posteuloj de la fiŝistoj same kiel tiuj de la kozakoj ankoraŭ nuntempe estas adeptoj de la malnovrusa religio kaj ankoraŭ parolas ian sufiĉe pratempan ukrainan lingvon. Sed la fiŝistoj ne interparolas kun la kozakoj, ĉar tiuj estas patroland-perfiduloj; kaj la kozakoj ne interparolas kun la fiŝistoj, ĉar tiuj estas fiŝmanĝantoj. (2007-07-18)

## Kiom kostas la mondo?

En la jaro 1997, *Robert Constanza*, nuntempa estro de la *Grund*-Instituto pri ekologia ekonomiko (*Grund-Institute for Ecological Economics*) en *Vermont*/Usono, provis taksi la profiton, kiun ĉiuj naturaj ekosistemoj akiras profit-done. Li adiciis la jarajn povumo-unitojn de ĉiuj ekosistemoj por la homoj kaj venis al la sumo de 33 bilionoj da dolaroj. (La servoj kaj bonhavoj de ĉiuj 193 ŝtatoj sur la Tero kalkuliĝas je ĉ. la duono). Kaj la resto? Ĝenerale oni konsideras la "el la naturo akiritan utilon" pli profitiga ol konservadon de la origina stato. Sed la bilancado ne ĉiam ŝajnas esti en ordo. La detruo de la filipinaj koralrifoj pro dinamita fiŝkaptado ekzemple kaŭzas postkostojn de po ĉ. 3000 eŭroj por hektaro. Tion kontraŭas la profito de po nur 870 eŭroj por hektaro. Sed - - - vd. la titolan demandon… (2007-06-02/03)


# Scienca Revuo Vol. 59 (2008) (3) / n-ro 214

**Oficiala organo de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)**
**Hejmpaĝo: http://www.eventoj.hu/isae/**

Pres-indikaĵoj: ISSN 0048-9557.
Eldonanto: ISAE Eldonkvanto: 200 ekzempleroj
Laserkopiita: Julio 2008 ĉe *Copy & Co, Marktplatz 30*
*DE - 37269 Eschwege*/Germanio
Redakcia komisiono: La estraro de ISAE kaj la du honoraj membroj

Membrokotizo de ISAE : € 20,00/jare
pagebla pere de via
a) landa peranto (resp. landa delegito)
aŭ rekte al
b) ISAE-konto ĉe UEA/*Rotterdam* (NL): isae-z *) *vd. sube*
IBAN: DE51 3701 0050 0318 2915 09, BIC: PBNKDEFF
t. e. por ISAE-anoj el Germanujo: vi pagu (anstataŭ kiel pli frue al ISAE/Sachs) al la germana poŝtĉeka konto de UEA n-ro 3182 91 509, BLZ 370 100 50 en *Köln*, Germanio, kun indiko "ISAE-jarkotizo (...jaro...) por UEA-konto isae-z"


### Landaj Perantoj de ISAE

| | | |
|---|---|---|
| Aŭstralio | *Libroservo AEA*<br>*143, Lawson St., Redfern, AU 2016 N.S.W.* | *<libroservo@esperanto.org.au>* |
| Brazilo | *Brazila Esperanto-Ligo (BEL)*<br>*C.P. 03625 BEL, BR 70084-970 Brasília* | *<bel@esperanto.org.br>* |
| Britio | *S-ro David Kelso*<br>*5, Craigenhill Rd., Kilncadzow*<br>*GB – Carluke, ML8 4QT* | *<davidekelso@yahoo.co.uk>* |
| Finnlando | *S-ino Päivi Saarinen*<br>*Ruorimielenkatu 5 C 23, FI-02320 Espoo* | *<paivi.saarinen@iki.fi>* |
| Francio | *S-ro J.Charles Trébouet*<br>*Ferme de Monchy, FR-60390 Auneuil* | *<trebouet.bohere@club-internet.fr>* |
| Irlando | *S-ino Joy Davies*<br>*9, Templeogue Wood, IE-Dublin 6W* | *<noviresp@eircom.net>* |
| Korea Resp. | *S-ro Cho Sung Ho*<br>*Biol.Fak.Inha Univ., KR Inchon 402-751* | *<shcho@inha.ac.kr>* |
| Norvegio | *Eldonejo Esperanto*<br>*Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo* | *<hara-ryg@online.no>* |
| Pollando | *S-ino Magdalena Tatara*<br>*Košmice Wilkie 323, PL32-020 Wieliczka* | *<mtatara@gmail.com>* |
| Svedio | *S-ino Lisbeth Andréasson*<br>*Kajsa Kavats gata 8, SE - 24235 Hörby* | *<bertil.andreasson@horby.mail.telia.com>* |
| Usono | *Esperanto-Ligo de Norda Ameriko (ELNA)*<br>*P.O.Box 1129, El Cerrito CA 94530, USA* | *<elna@esperanto-us.org>* |

***) Nepre informu pri via membrokotizpago laŭ b) (kun indiko de la kompleta poŝtadreso kien estu sendata Scienca Revuo) la eldonanton:**
***Prof Dr R Sachs, Vor dem Brückentor 3, DE-37269-Eschwege/Germanio***
***Tel./Fakso xx49-(0)5651-331866; <ISAESachs@aol.com>***